

# LA ANĜEVA FOLIO

LA FEUILLE ANGEVINE

Bonajn jarfinfestojn al ĉiuj!  
Bonnes fêtes  
de fin d'année à tous!

## Kelkaj vortoj

Ni ĵus travivis duan jarduonon riĉan je eventoj, kies priraportojn vi legos en ĉi folio. La venonta jaro anonciĝas fruktodona dank' al la 100-a Universala Kongreso en Lillo kun miloj da atendataj partoprenantoj. Ne forgesu aliĝi ([www.uea.org/kongresoj](http://www.uea.org/kongresoj)). La jarfino alprokisiĝas, do, nome de nia komitato, mi deziras al vi feliĉajn festojn kaj esperas por vi kaj viaj familianoj, feliĉon kaj bonfarton por 2015.

*Pierre Jagueneau, Prezidanto*

## Quelques mots

Nous venons de vivre un deuxième semestre très riche en événements dont vous lirez les compte-rendus dans cette feuille. L'année prochaine s'annonce fertile avec le 100ème Congrès Mondial à Lille et ses milliers de participants attendus. N'oubliez pas de vous y inscrire ([www.uea.org/kongresoj](http://www.uea.org/kongresoj)).

La fin de l'année approche, aussi, au nom du conseil d'administration, je vous souhaite de bonnes fêtes et vous adresse à vous et à votre famille, tous mes vœux de bonheur et de santé pour 2015.


*Pierre Jagueneau, Président*

## Kanada vintro kiel rolulo

Mi havas antaŭ mi simpatian libron : "Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado", de Louis Fréchette. Se estas vero, ke multaj legantoj elektas siajn librojn laŭ la beleco de la kovrilo, tiam ĉi tiu volumeto estas destinita al furora vendo. La kovrilpaĝon ornamas reproduktaĵo de bela pentraĵo de la kanada artisto Frederick Simpson Coburn (1871-1960), kiu montras vintran pejzaĝon kun domoj kaj ĉevalĉaroj. Cetere, li estas la aŭtoro de ĉiuj aliaj ilustraĵoj en la libro, inkluzive de ĉarmaj vinjetoj, mapoj kaj desegnaĵoj.

Sed kio pri la enhavo? Komence, ni diru, ke la volumo enhavas kvar informriĉajn antaŭparolojn. Per tiuj ni ekscias pri la historio de la verko mem. Kvankam la aŭtoro estis franclingva, li unue publikigis ĝin en la angla lingvo, kun la celo montri al siaj najbaroj la vivon kaj kulturon de la franclingva Kanado. Ĉi tiu unua versio sukcesis ĉe la publiko. Poste li publikigis la franclingvan version, kiu kurioze ne estis tiom sukcesa. La originalo enhavas dekdu rakontojn. La Esperanta traduko konsistas el ses elektitaj pecoj, sub la responso de kebeka Esperantisto Vincent Beaupré (1914-1984), sed neniam oni eldonis ĝin - oni disdonis ĝin per fotokopioj. Antaŭ nelonge, Franciska Lorrain reviziis la tutan tekston por ĉi tiu ĉarma eldono de Esperanto-Societo Kebeka, en 2013.

Rezultis bonega volumo, kiun oni legas kun plezuro. Oni povas diri, ke la ĉefa rolulo en tiu serio da rakontoj estas la severa kanada vintro, kun neĝoŝtormoj,



ventego kaj torentaj riveregoj, kiuj antaŭ cent jaroj prezentis konstantan defion al la homa vivo. Meze de tiu kruda klimato, flagras la varmo de la kanada popolo, kiu alfrontas la defion per siaj forto, kuraĝo, stoikeco kaj delikata religio. Foje, ankaŭ popola humuro mildigas la kruelecon de tranĉa malvarmego. Malfacile estus elekti la plej bonan rakonton. Laŭ mia persona gusto, mi elektus la duan: "En neĝoŝtormo". Ĝi priskribas aŭdacan veturadon de du kamaradoj en senhoma

regiono, sub furioza vetero; la situacio fariĝas danĝera kaj senelira, ĝis ili ekvidas kabanon kun lumo...

La intenco de la aŭtoro montri la vivocirkonstancojn en franca Kanado antaŭ pli ol cent jaroj estas plene atingita. La verko havas tiun konvinkan etoson, kiu faras la bonan literaturon. Alivorte, ĝi kaptas la leganton en tiun scenejon, eĉ se tiu leganto estas brazilano, kiu neniam tuŝis neĝon. Jen estas la magio de literaturo.

La Esperanta traduko estas senriproĉa.

Sobra, eleganta prozo, kiu uzas ĉiujn rimedojn de nia lingvo por esprimi ĉi tiu, suka teksto. Fakte, oni tuj forgesas, ke ĝi estas

traduko, sed flue ĝuas la enhavon kiel originalaĵon - kaj jen ĉi tio estas la plej alta laŭdo farebla al traduko. Abundas piednotoj, kiuj faciligas la komprenon de detaloj. Mi ne trovis eĉ unu preseraron. Gratulon al la Kebeka Societo pro ĉi tiu valora kontribuo al nia bretaro!

*Paŭlo Sergio Viana - Brazilo*

## Revige pri alternativaj lernejoj en Koreio

Tre viglan vesperon ĝuis la anĝeva grupo pasintan 24-an de septembro okaze de la veno de Ana Sonĝanta. Ŝi ne prelegis enuige, sed pedagogie partoprenigis la ĉeestantojn laŭeble plej multe tiklante scivolemon kaj instigante al pripensado. Do krom Ana mem, neniu sonĝis dum la vespero ĉar ŝi trafte malebligis ĉies endormiĝon! Tamen revige ŝi rakontis pri kiel estas organizita la lernigado por geknaboj en la alternativa lernejo en kiu ŝi laboras. Temas pri unu el la 200 t.n. LLG (Liberaj Lernejoj por Geknaboj) kiuj funkcias sen estroj, sen konkurenco, sen ekzamenado. Lernas ĉiu laŭ sia ritmo, laŭ propraj emoj (ekz. kulturaj legomojn en apuda kampo, poste kuiru ilin). Kaj montriĝas ke kiam la lernantoj reiras al la tradicia sistemo (plej prema sinmortigo de studentoj oftas tie!), ili ne estas malpli kapablaj ol la aliaj. Supozeble ili eĉ estas psiĥologie pli bone ekipitaj, akirinte savajn memfidon kaj relativemon kadre de LLG. Logike,



La partoprenantoj dum la prezentado far Ana

en tiuj alternativaj lernejoj ("Feliĉa Lernejo" nomiĝas tiu de Ana!) alvenis la ideo uzi alternativon lingvon. Do jen Ana turnis sin al Esperanto. Sed por konkretigi la aferon, ŝi decidis ne nur instrui Esperanton uzante ekzemple skajpadon por ebligi tujbabiladon inter diversdevenaj foraj esperantistoj, sed ankaŭ organizas ĉiujare vojaĝojn kun deko da lernantoj por malkovrigi nekonatajn mondpartojn pere de Esperanto. Ŝi ankaŭ menciis reciproke riĉigan sperton, kiam Mišel Fonten venis el Francio instrui en Koreio en tiuj lernejoj. Eble la onta vojaĝo estos al Francio ĉirkaŭ UK en Lillo.

En la posta diskutado, kiu nekutime longe daŭris ĝis malfrua horo, ekaperis la ideo pri kunlaborado inter grupoj de Anĝevo kaj tiu de Ana en kamparo apud Seulo. Ŝia sephalta turneo daŭris poste en la regiono de Burgenbreso, kie ŝi planas dungite instrui (ŝi sufiĉe regas la francan) en bazlernejo ĝis decembro. Sukceson al ŝi, kaj... sekvote!

Markovo-Vito

Photo : Jeannine Daguin

## Des écoles alternatives en Corée porteuses de rêves

Le groupe espérantiste angevin a passé une soirée très animée le 24 septembre, à l'occasion de la venue d'Ana Sonĝanta. La conférence ne fut pas ennuyeuse, mais elle fit participer l'auditoire de façon pédagogique, en titillant sa curiosité et en incitant à la réflexion. Aussi personne ne rêva pendant la soirée car elle empêcha pertinence chacun de s'endormir!

Toutefois elle raconta comment est organisé l'enseignement pour enfants dans l'école alternative où elle travaille. Au sujet d'une des 200 LLG (Liberaj Lernejoj por Geknaboj) qui fonctionne sans directeur, sans compétition, sans examen. Chacun apprend selon son rythme, ses propres souhaits (ex. cultiver des légumes dans le champ voisin, ensuite les faire cuire). Et il apparaît que lorsque les élèves retrouvent le système classique (plus opprimant, le suicide d'élèves arrive souvent!), ils ne sont pas moins capables que les autres. Ils sont même mieux dotés psychologiquement, en ayant acquis une confiance salutaire et une capacité à relativiser dans le cadre de LLG.

Dans ces écoles (nommées "École heureuse" par Ana) l'idée vint d'utiliser une langue alternative, aussi Ana s'est tournée logiquement vers l'espéranto. Mais pour concrétiser l'idée, elle décida de ne pas utiliser seulement Skype pour permettre des conversations immédiates entre des espérantophones d'origines diverses, mais aussi d'organiser chaque année des voyages avec une dizaine d'élèves pour faire découvrir par l'espéranto de nouvelles régions du monde.

Elle mentionna aussi une riche expérience réciproque, quand Michel Fontaine vint de France pour enseigner en Corée dans ces écoles.

Dans la discussion qui suivit, qui continua inhabituellement jusqu'à une heure tardive, l'idée vint de collaborer entre le groupe angevin et celui d'Ana près de Séoul. Sa tournée de sept étapes va continuer dans la région de Bourg-en-Bresse, où elle a été engagée pour enseigner en école primaire jusqu'en décembre (elle maîtrise suffisamment le français). Succès à elle, et... à suivre!

La venanta Anĝeva Folio enhavos ampleksan raporton pri  
**LA ZAMENHOFA TAGO**  
 de dimanĉo 14 decembro 2014

Le prochain Anĝeva Folio donnera un compte rendu complet de  
**LA JOURNÉE ZAMENHOF**  
 du dimanche 14 décembre 2014

**Notinda dato :**

**Sabato 28 februaro 2015**  
**ĜENERALA KUNVENO**  
 en Centre Jean Vilar d'Angers

**Samedi 28 février 2015**  
**ASSEMBLÉE GÉNÉRALE**  
 au Centre Jean Vilar d'Angers



# Impresoj el Dinano

*Inter la 9a kaj 16a  
aŭgusto 2014 okazis  
SAT-kongreso en  
junlaborista hejmo de  
la bela urbeto Dinano  
(Bretonio), samtempe  
kiel tiu de SAT-Amikaro  
(franclingvanoj).*

Proksimume 140 homoj (SAT-anoj aŭ ne) partoprenis. Krom Francio (ink. du Anĝevanoj), ili venis el deko da landoj (precipe eŭropaj sed ankaŭ el Aŭstralio, Madagaskaro...).

La ĉefa temo estis : «Civitanoj loke konstruas ontecon». Okazis multaj interesaj kunvenoj, debatoj ebligis interŝanĝojn, ekz. loka mono, permakulturo, energia transiro, infaneduko, lingva justeco, cirkla ekonomio... (ŝercemaj bretonaj koboldoj «aperis» per aviztabuloj kiam la kunvenoj devis ĉesi !).

Krom tio, ni povis ĉeesti ĉiujn «administrajn» kunvenojn de la asocio, interalie laborkunsidojn dum kiuj la SAT-anoj ĝuis ampleksan parolvicon. Ankaŭ okazis fakaj kunsidoj (ekz. poresperanta informado, eldona kooperativo) kaj frakciaj kunsidoj (liberpensuloj, komunistoj...).

La kultura kaj distra programo estis riĉa. Vespe : bretona nokta festo, teatro (bretonaj legendoj, parodio de klasika tragedio «Karakalo» en kiu ludis Vito, anĝevano ! Popoldancprogramo kun la nederlanda grupo «Kapriol!» sur dinana placo, lignaj popolaj ludiloj, strat-teatro, altkvalita adiaŭa vespero kun «malfermita» sceno, promenadoj kaj ekskursoj diversaj (dinanaj remparoj...), tre interesa renkonto kun ŝtonmineja asocio (en Le Hinglé), Cancale, St Malo,,,



Resume : vigla asocia renkonto, riĉa programo, ĝoja etoso ! Dankegon al la paciencaj membroj de la organiza komitato (ankaŭ pro la bretondanca trejnado !)...

La venonta SAT-kongreso okazos en Nitra en Slovakio, de la 8 ĝis la 15 aŭgusto 2015.

Arlette Frangeul

## Impressions de Dinan

Du 9 au 16 août 2014 s'est tenu le congrès de SAT (association mondiale anationale) dans un foyer de jeunes travailleurs de Dinan (Bretagne), conjointement avec celui de SAT-Amikaro (francophones). Ont participé environ 140 personnes (membres de SAT ou non) d'une dizaine de pays. Ils venaient de France (entre autres 2 Angevins) et d'Europe mais aussi d'Australie, de Madagascar...

Le thème principal était : "Les citoyens construisent l'avenir localement". De nombreux et intéressants débats et réunions ont permis les échanges, ex. sur la monnaie locale, permaculture, transition énergétique, éducation des enfants, équité linguistique, économie circulaire... (de facétieux lutins bretons «apparaissaient» sur des pancartes, lorsque la réunion devait se clore !).

De plus, nous pouvions assister à toutes les réunions administratives de l'association, entre autres, des séances de travail où les membres de l'association avaient un large droit de parole. Il y avait également les réunions spécialisées (ex. information sur l'espéranto, coopérative d'édition) et des réunions de groupes (librepenseurs, communistes...).

Le programme culturel et de loisirs était riche.

En soirée : fest-noz, théâtre (légendes bretonnes, parodie de tragédie classique Caracalla où

a joué Vito, (un Angevin), bal folk avec le groupe néerlandais «Kapriol!» sur une place de Dinan, jeux populaires en bois, théâtre de rue, soirée d'adieu de haut niveau avec «scène ouverte» promenades et excursions diverses, une rencontre très intéressante avec l'association sur les mines de granit (commune du Hinglé), Cancale, St Malo...

Pour résumer : rencontre associative dynamique, programme riche, ambiance joyeuse ! Merci aux membres du comité d'organisation pour leur patience (en autres pour l'apprentissage des danses bretonnes !)...

Le prochain congrès de SAT se déroulera à Nitra en Slovaquie du 8 au 15 août 2015.

Arlette Frangeul

## Tago por Paco 2014

Nia Esperanta klubo estas parto de la kolektivo por Paco kiu, dektriafoje, organizis sian Feston por Paco kaj ne-violento.

Ĉe la paco-monumento kiu staras sur la placo de Paco, Jeanik Marolleau legis la malferman paroladon en Esperanto. La enkonduko de tiu mesaĝo estis omaĝo al la soldatoj mortintaj inter 1914 kaj 1918, kaj al la revenintaj soldatoj dispremitaj en siaj korpo kaj koro. Omaĝo estis donita ankaŭ al ĉiuj aliaj viktimoj : seksperfortitaj virinoj, vidvinoj sen vivrimedoj, militaj orfoj...

Oni cetere elvokis la viktimojn de nunaj militoj kaj suferoj : malsatego, paludismo, lepro...

Delegito de ĉiu asocio de la kolektivo por paco\* parolis siavice.

Pierre Jagueneau, nome de nia asocio, parolis pri la rilato inter Esperanto kaj paco : "oni povas imagi ke kaze de konfliktoj, malfacilaĵoj aŭ malkonsentoj, se homoj de diversaj kulturoj, diversaj religioj, posedas komunan kaj neŭtralan lingvon, ili povos diskuti kaj pli facile solvi la problemojn".

Post festa tempo (koncerto kaj

trinkado), marŝo por paco estis organizita tra la urba centro por atingi la teatrejon Chanzy. Tie, post ĝoja pikniko, ĉiu pretigis la diversajn budojn. Finfine, junula trupo (kompanio "La Tria metamorfozo") proponis teatran spektaklon : "Sinjoro de la Cimoj". Sekvas resumo : grupo da adoleskantoj trovas sin perdita en cifereca mondo sen plen-kreskuloj, sen reguloj, sen limoj... Kiuj estas ili ? Projekcioj de si en la reton, forgesitaj de la ekstera mondo, la avataroj kiuj estiĝis el spuroj de ilia retnavigado, forviŝ-minacataj...

En tiu klimato de duboj kaj timoj, klanoj formiĝas ĉirkaŭ du ĉefoj : unuflanke juna knabo asistata de sciencista kamarado provas starigi societon trudante leĝojn kaj aliflanke karisma ĉefino, kiu senlime pretas profiti la novajn libereblojn haveblajn al si. La 25 aktorojn kaj dancistojn akompanis ses kantistoj kaj kvin muzikistoj. Tio estas libera adaptaĵo de "Lord of the Flies" far William Golding.

Indas menci la engaĝiĝon de 221 urbestroj de Maine-et-Loire favore al la Hiroŝima alvoko. Tial nia departemento unuarangas en Francio por peti la detruon de ĉiuj nukleaj armiloj antaŭ 2020.



## Journée de la paix 2014

Notre club d'espéranto s'est joint au collectif pour la paix qui organisait pour la 13ème année sa fête pour la paix et la non-violence.

Place de la paix, devant le monument éponyme, Jeanik Marolleau lut en espéranto le discours d'ouverture. Ce fut un hommage aux poilus disparus entre 1914 et 1918, et aux soldats revenus broyés dans leur chair et dans leur âme. L'hommage fut rendu aussi à toutes les autres victimes : femmes violées, veuves sans ressources, orphelins... On évoqua également les victimes des autres guerres et souffrances : famine, paludisme, lèpre....

Un représentant de chaque association œuvrant pour le Collectif de la Paix\* fut invité à s'exprimer.

Puis, au nom de notre association, Pierre Jagueneau évoqua le rapport entre la paix et l'espéranto : "Nous partons du principe que si des gens de cultures différentes, de religions différentes, peuvent se comprendre via une langue commune, neutre, ils pourront au moins s'expliquer. En cas de conflits, de difficultés, de différents, ils pourront essayer de faire valoir leurs points de vue respectifs, tranquillement dans la paix".

Après un temps festif (concert et verre de l'amitié), une marche de la paix fut organisée à travers le centre ville pour rejoindre le théâtre Chanzy. Sur place, chacun s'affaira pour l'installation des divers stands, après un joyeux pique-nique. Enfin, une troupe de jeunes artistes proposa un spectacle théâtral donné par la Compagnie de la troisième métamorphose : "Sa majesté des Bugs". En voici le résumé

Un groupe d'adolescents se retrouve perdu dans un monde numérique sans adultes, sans règles, sans limites...

Qui sont-ils ? Des projections d'eux-mêmes sur le réseau, oubliées du monde extérieur, des avatars ayant pris vie, des traces de leur navigation sur le web, menacées d'effacement...

Dans ce climat de doutes et de peurs, les clans se forment autour de deux leaders : un jeune garçon aidé de son camarade scientifique tentant de recréer une société en imposant des lois et une meneuse charismatique prête à tout pour profiter des nouvelles libertés qui s'offrent à elle. Les 25 acteurs et danseurs sont accompagnés par six chanteurs et cinq musiciens. C'est une libre adaptation de "Sa Majesté des mouches" de William Golding.

Il faut noter que 221 maires du Maine-et-Loire ont signé l'appel d'Hiroshima, ce qui en fait le département le plus engagé de France. L'appel d'Hiroshima demande la suppression de toutes les armes nucléaires avant 2020.

*\*Mouvement pour la paix en marche, Solidarité France Palestine, Anciens Appelés d'Algérie et Amis contre la guerre (4ACG), La Paix en marche, Maisons de Paix, et le Centre Culturel Angevin d'Espéranto et plusieurs autres.*





Traduction de la page 1

## L'hiver canadien comme acteur

J'ai devant moi un livre sympathique : "Histoires de Noël du Canada français" de Louis Fréchette. Si il est vrai que beaucoup de lecteurs choisissent leurs livres selon la beauté de la couverture, alors ce petit volume là est destiné à diffusion frénétique.

La reproduction d'une belle peinture de l'artiste canadien Frederic Simpson Coburn (1871-1960) orne la couverture, qui montre un paysage d'hiver avec des maisons et des attelages de chevaux. D'ailleurs, toutes les autres illustrations du livre, y compris les charmantes vignettes, les cartes et dessins, sont du même auteur.

Mais qu'en est-il du contenu ? Pour commencer, nous dirons que le volume contient quatre préfaces riches d'informations. Par celles-ci nous apprenons l'histoire de l'œuvre même. Bien que l'auteur fût francophone, il le publia d'abord en anglais dans le but de montrer à son entourage la vie et la culture du Canada français. Cette première version eut du succès auprès du public. Ensuite il publia la version française qui, curieusement, ne rencontra pas autant de succès. L'original contient douze histoires. La traduction en espéranto, sous la responsabilité de

l'espérantiste québécois Vincent Beaupré (1914-1984), consiste en six morceaux choisis, mais on ne l'a jamais imprimée - Elle a été distribuée en photocopies.

Il n'y a pas longtemps, en 2013, Francisca Lorrain revisa tout le texte pour cette plaisante édition de la Société Québécoise d'Espéranto.

Un très bon volume en résulta, qu'on lit avec plaisir. On peut dire que le principal acteur de cette série d'histoires est le rude hiver canadien, avec des tempêtes de neige, des vents violents et des fleuves torrentueux, qui, il y a des centaines d'années, présentaient un défi permanent à la vie humaine. Au milieu de ce rude climat, la chaleur du peuple canadien qui affronte le défi par sa force, son courage, son stoïcisme et son délicat penchant religieux. Parfois aussi, l'humour populaire adoucit la cruauté du froid tranchant.

Il est difficile de choisir la meilleure histoire. Selon mon goût, je choisirais la deuxième : "dans une tempête de neige". Elle décrit l'audacieuse randonnée de deux camarades dans une région inhabitée par un

temps terrible. La situation devient dangereuse et sans retour, jusqu'à ce qu'ils aperçoivent un cabanon éclairé...

L'intention de l'auteur de montrer des épisodes de vie dans le Canada français il y a plus de cent ans est pleinement réussie. L'œuvre possède cette atmosphère attachante qui fait la bonne littérature. En d'autres termes, le lecteur est captivé par l'histoire, même si ce lecteur est un brésilien qui n'a jamais touché la neige. C'est là la magie de la littérature.

La traduction en espéranto est irréprochable. Une sobre et élégante prose, qui utilise tous les moyens de notre langue pour aboutir à un texte savoureux et riche en expression. En fait, on oublie tout de suite que c'est une traduction, et on en jouit comme d'un original.

Les notes en bas de page abondent, ce qui facilite la compréhension des détails. Je n'ai pas trouvé une seule erreur de frappe.

Félicitations à la Société québécoise pour cette contribution de valeur à notre bibliothèque !

Paūlo Sergio Viana - Brazilo  
Source : revue Kontakto n° 2014:1

## En la "Festo de la civitana transiro 49" Esperanto ĉeestis

La 27 kaj 28 de septembro, iniciate de Jeanik Marolleau kaj Thierry Menan, la Esperanto Centro de Angers partoprenis en la "Festo de la Civitana Transiro 49". Tiu festo okazis en la belega parko kaj konstruaĵoj de la agrikultura liceo "Le Fresne" apud Angers, en Ste-Gemmes-sur-Loire.

La multaj intervenantoj zorgeme proponis al la vizitantoj novan sintenon por solidara vivo : instigo al ĉeso de malŝparado, urĝeco alimaniere produkti kaj konsumi, kaj propono de novaj alternativoj. Nia klubo partoprenis en tiu demarŝo.

Multaj homoj vizitis nian budon. Ofte, temis pri junuloj, kiuj ne hezitis halti por peti informojn pri funkciado de la lingvo, vortfarado kaj pri ties historio. Kelkaj ankaŭ venis al atelieroj "presentado de la lingvo". Ili konsistis en komentita lumbildaro, aŭskultado de parolata lingvo dank'al skeĉeto kaj legado de fragmento de la verko "La Eta Princo" kaj finfine demandoj kaj respondoj.



### L'espéranto a participé à la "Fête de la transition citoyenne 49"

Les 27 et 28 septembre, à l'initiative de Jeanik Marolleau et Thierry Menan, le Centre Culturel Angevin d'Espéranto s'est associé pour la première fois à la "Fête de la transition citoyenne 49" qui se déroulait cette année dans le superbe parc et les locaux du Lycée Agricole du Fresne, tout près d'Angers, à Ste-Gemmes-sur-Loire.

Les nombreux intervenants furent soucieux de proposer aux visiteurs une nouvelle démarche de vie, solidaire, qui incite à ne plus gaspiller et à produire en s'orientant vers de nouvelles alternatives. C'est dans cette démarche que notre club s'est inscrit.

Notre stand "espéranto" a vu passer de nombreux visiteurs, souvent des jeunes qui n'ont pas hésité à formuler des demandes sur le fonctionnement de la langue, sur son histoire, sur la construction des mots. Certains sont venus aussi aux ateliers "présentation de la langue" avec projection d'un diaporama commenté, écoute de la langue parlée grâce à un petit sketch et une lecture en espéranto d'un passage du "Petit Prince".

Ce furent deux journées très positives pour la diffusion de l'espéranto.

Tiuj du tagoj estis tre pozitivaj por plidiskonigo de Esperanto.



# Les cours d'espéranto ont repris à Angers

## Débutants :

Cours Municipaux - place St.Eloi, Angers  
le samedi de 10h à 11h30  
Renseignements : 02 41 05 38 80  
[www.angers.fr/institutmunicipal](http://www.angers.fr/institutmunicipal)

## Niveau intermédiaire :

Salle du Petit-Mathurin,  
avenue Jean XXIII, La Roseraie, Angers  
le mercredi de 18h30 à 20h  
Renseignements : 02 41 73 17 97

## Conversation :

Salle du Petit-Mathurin,  
avenue Jean XXIII, La Roseraie, Angers  
le vendredi de 18h à 20h30  
Renseignements : 02 41 73 17 97



Le groupe "conversation" salle du Petit Mathurin



Le groupe "débutants" aux Cours Municipaux

## UNUA TASKO EN LA KONVERSACIA KURSO

Jeanik proponis al ni traduki artikolon el tirita el loka ĵurnalo. Jen la rezulto :

### En Anĝevo, dekopo da ebruloj en aŭto

La ŝoforo, juna studento en supera lernejo entenis, po 1,82 gramojn da alkoholo sango litre.

La afero plu restas nekredbla por tiuj anĝevaj policistoj. Mardon iom post noktomezo, ili malfermegis la okulojn, post haltigo de Mazda aŭto sur la anĝeva bulvarado Bon-Pasteur. Cent kilometroj hore estis taksitaj pri la rapido de tiu aŭto. Interne de ĝi, oni malkovris dek personojn : dek studentojn de supera lernejo de la urbo.

"Unu estis en la kofro kaj la aliaj en la kajuto" diris oficiro de la anĝeva policejo. Li aldonis : "Ili estis ebriaj, ĉefe la ŝoforo dudekjaraĝa". Kontrolita, li entenis po 1,82 gramojn da alkoholo sango litre. Oni veturigis lin al policejo kie li estis enkarcerigita en malebriigan ĉelon por la cetero de la nokto.

La postan matenon, oni decidis provizoran arestadon kaj forprenis lian kondukpermesilon. Baldaŭ, la ŝoforo estos asignota.

Malkvieta, la anĝeva policisto diris : "Preskaŭ okazis katastrofo. Imagu la sekvon; estis nur noktomezo. Tiam komenciĝas la vespero por studentoj. Jam, ili entenis multe da alkoholo. Kio okazontus se ili ne estus arestitaj kaj se ili plu drinkus?"

Jen la originala teksto :

### À Angers, ivres et à dix dans la voiture

Le conducteur, un jeune étudiant d'une grande école, avait un taux de 1,82 g d'alcool par litre de sang.

Ces policiers angevins n'en reviennent toujours pas. Dans la nuit de mardi à mercredi, guère après minuit, ils ont écarquillé les yeux après avoir arrêté une voiture Mazda, boulevard du Bon-Pasteur à Angers. Qui roulait à une vitesse estimée à 100 km/h.

À l'intérieur du véhicule, ils ont découvert pas moins de dix personnes. Dix étudiants d'une école supérieure de la ville. "Un dans le coffre et les neuf autres dans l'habitacle", raconte un officier du commissariat d'Angers. Qui ajoute : "Ils étaient ivres. En particulier le conducteur, âgé de 20 ans".

Contrôlé, il avait un taux de 1,82 g d'alcool par litre de sang. Il a été emmené au commissariat où il a été placé en cellule de dégrisement tout le reste de la nuit. Avant d'être mis en garde à vue le lendemain matin. Son permis a été retiré. Il sera convoqué prochainement devant les juges. "On a frôlé la catastrophe, s'inquiète un policier angevin. Rendez-vous compte, il n'était que minuit. C'est le début de soirée pour des étudiants. Ils étaient déjà fortement alcoolisés. Qu'est-ce qui aurait pu se passer s'ils n'avaient pas été arrêtés et s'ils avaient continué à boire ?".

Jean-François MARTIN - Ouest-France du 03/10/2014

## Nous contacter

### Centre Culturel Angevin d'Espéranto

41 rue Pierre Melgrani 49000 Angers  
Tél. 02 41 73 17 97 - Courriel : [info@esperanto-angers.fr](mailto:info@esperanto-angers.fr)

## Vous informer

### [www.esperanto-angers.fr](http://www.esperanto-angers.fr)

[www.esperanto-france.org](http://www.esperanto-france.org), [www.esperanto-jeunes.org](http://www.esperanto-jeunes.org)  
[www.uea.org](http://www.uea.org), [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net)